

Helpo bezonata pro orfiĝo de tri infanoj

Kia estonteco por tri geinfanoj en Aguidahoue?

Alvoko de François HOUNSOUNOU.

La situacio

Aguidahoue estas vilaĝo en Benino, distanca 20 km de Lokossa, en la komunumo Athieme. Tie vivis juna edza paro (Thomas AHENAKPO kaj Béatrice HOUNSOUNOU, fratino de François) kun kvar gefiloj, de kiuj unu jam antaŭe mortis.

La 15an de novembro 2012, la edzo Thomas mortis kaj restis Béatrice kun la tri gefiloj, Solange (12-jara), Grégoire (10-jara) kaj Chantale (8-jara). Ŝi subtenis la gefilojn sendepende per vilaĝa komerceto.

La 17an de majo 2014 Béatrice malsaniĝis kaj ne moviĝis. François (ŝia pli granda frato) kondukis ŝin en malsanulejo esperanta savi la vivon al sia fratino. La 19an de majo, ŝi tamen mortis. Tio kondukas la gefilojn al nova situacio, nova paĝo en iliaj vivoj.

Pri la gefiloj kaj kion ni bezonos por ili

Solange estas metiolerntino. Ŝi lernas kudri kaj la patrino jam pagis la duonon de la metiokontrakto. Grégoire kaj Chantale estas lernantoj en elementa lernejo. Grégoire trapasos la 23an de junio la ekzamenon por eniri en kolegio. Chantale estas en la dua klaso elementa.

Pro manko de logika prizorganto kaj la vivkondiĉo de François, la situacio de Solange, Grégoire kaj Chantale ĉiu-tage timigas kaj cerbumigas lin pri edukado, sano kaj manĝo. Tial ĉi tiu alvoko por subtenado de la gefiloj:

1- Solange : la pago de restanta metiokontrakto mono pri metiolerntado - la pago de la diplomakirado, la aĉeto de kudromaŝinoj kaj la lupreno de metiejo, manĝokostoj kaj eventualaj sankostoj, la aĉeto de vestaĵoj dum la kristnaska festo kaj novjaro. Ŝi finos lerni kudradon en 2018.



2- Grégoire : la pago de lerneja imposto, la pago de lernejaj materialoj (kajeroj, lerneja sako, skribiloj ktp), la kudrado de lerneja vestaĵo, manĝokostoj kaj eventualaj sankostoj, la aĉeto de vestaĵoj dum la kristnaska festo kaj novjaro.

3- Chantale : la pago de lernejaj materialoj, la sendado de ludiloj al ŝi, manĝokostoj kaj eventualaj sankostoj, la aĉeto de vestaĵoj dum la kristnaska festo kaj novjaro. Ŝi eventuale libervole povus lerni

metion kiam ŝi mem decidis.

Tabelo da kostoj por enlernejgado

-LERNEJA IMPOSTO -MATERIALOJ	KVANTO POR 1 INFANO	PREZO POR UNUO		SUME	
		Franko CFA	Eŭroj	Franko CFA	Eŭroj
Lerneja imposto	1	14 000	21,50	14 000	21,50
TP (scienca kajero pri la vivo kaj la tero) (S.V.T.)	4	500	0,80	2 000	3
Kajeroj 100 paĝoj	10	100	0,15	1 000	1,50
Kajeroj.200 paĝoj.	3	200	0,30	600	0,90
Linilo	1	100	0,15	100	0,15
Gumo	1	100	0,15	100	0,15
Skatolo de koloraj Krajonoj	1	150	0,20	150	0,20
Krajonoj	5	25	0,03	125	0,20
Bluaj skribiloj	5	100	0,15	500	0,80
Ruĝaj skribiloj	5	100	0,15	500	0,80
Krajonpintigilo	1	25	0,03	25	0,03
Lerneja sako	1	2 500	3,85	2 500	3,85
Necesaj matematikaj helpiloj	1	500	0,80	500	0,80
TOTALO		18 400	28,26	22 100	34,06

Ĉi tiu tabelo resumas la bezonajn lerneajn materialojn por Grégoire. Jen pri la bezonoj de la tri :

1-PRIZORGADO

cxiu infano bezonas 100fcfa tage por matenmangxo.Do monate estas 3000 fcfa

a-Matenmangxo:Cxiu infano:3000 fcfa monate

b-Tagmangxo kaj vespermangxo: cxiu 15000 fcfa(inkluzive sapoj por inducxi kaj lavi vestaĵojn) monate.

Do monate la tri infanoj bezonas:3000 fcfa x 3=9000 fcfa

15000 fcfa X 3 = 45000 fcfa

Sume: 54000 fcfa egalvalore = 82,44 euxroj(monate por la tri geinfanoj)

2-LERNEJO

a- Grégoire: 34,04 euxroj lerneja jaro.

b- Chantale: 13,89 euxroj lerneja jaro.

3-METIO-LERNADO DE SOLANGE

- pago de la metio lernado kontrakto restanta: 50.000 fcfa

- acxeto de la kudromacxino: 80.000 fcfa

- diplomtago en la urbodomo : 150.000 fcfa
 - matenbenado per eta ceremonio : 20.000 fcfa
 - ekzamenokosto : 13.000 fcfa
 - diplomo + atestilo : 15.000
- sume:378.000 fcfa egalvalore 577,09 euxroj.

Ni antaŭdankas la interesigontojn, kiuj kontribuos al la pliboniĝo de la vivsituacio de Solange, Grégoire kaj Chantale.